# *Fihav 2016: premiado al plej bonaj produktoj.*




Havano, 4 nov (RHK) La 34-a internacia foiro de Havano Fihav 2016 fini?as hodia? en la Kongresa Palaco de Havano kun la premiado de la plej bonaj produktoj, pavilonoj kaj dizajnoj de la standoj ekspoziciataj ekde la pasinta lundo en Expocuba, ekspoziciejo situanta en la urba periferio.

La foiro fokusigis sian ?efan agadon en la unua forumo de investoj, spaco privilegiita por starigi rilatojn kun Kubo kaj konkretigi negocojn, kies ?efa celo estas diversigi la originon de la eksterlanda kapitalo kaj ne dependi de malmultaj merkatoj.

Tiu ?i strategio estas kongrua kun la konceptigo de la ekonomia modelo de la lando kaj la projekcioj por landa evoluigo ?is la jaro 2030.

La foiron partoprenis pli ol 3 mil eksponantoj el 73 landoj  kio igas ?in la plej granda komerca foiro de la lastaj jaroj en la insulo.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/110980-fihav-2016-premiado-al-plej-bonaj-produktoj

**Radio Habana Cuba**